

INTERNACIA LINGVO

UNUA KONGRESO DE VALENCIA E-o FEDERACIO

INTERNACIA FESTIVALO
EN SOVET - UNIO

TRAIRO DE HISPANUJO:
VALENCIA KOMUNUMO

RADIOAMATOROJ



B. GOLDEN:

KONTRIBUAJO AL LA INTERLINGVISTIKA TERMINOLOGIO

Neniel mi deziras morti antaŭ la jaro 1992^a

UTILAJ ADRESOJ
DIRECCIONES UTILES

* **UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO**
NIEUWE BINNENWEG 176* 3015bj
ROTTERDAM (HOLANDA)

* **HISPANA ESPERANTO FEDERACIO**

§ **Centra Oficejo:**

Rodríguez de San Pedro, 13-3ª, P-7.
28015 MADRID

§ **Libroservo:**

Apartado 119
47080 VALLADOLID

§ **Prezidanto: Antonio ALONSO**

Apartado 714
15780 SANTIAGO de COMPOSTELA (LA CORUÑA)

* **HISPANA INSTITUTO DE ESPERANTO**

Apartado 2428
08080 BARCELONA

* **HISPANA ESPERANTO MUZEO**

Doctor Zamenhof, 12
SANT PAU D'ORDAL (Barcelona)

* **ANDALUZIA ESPERANTO ASOCIO**

Apartado 864 (Málaga)

* **ASTURA ESPERANTO ASOCIO**

Begoña, 25
GIJON (Asturias)

* **KANTABRA ESPERANTO ASOCIO**

Apartado 2240 (Santander)

* **KATALUNA ESPERANTO ASOCIO**

Apartado 32318 (Barcelona)

* **VALENCIA ESPERANTO ASOCIO**

G.V./ Fernando el Católico, 45
46008 VALENCIA

* **ESPERANTO-FONDAJO "F. SOLER"**

Duque de Calabria, 4
46005 VALENCIA



Esperanto-Fundación
"Fernando Soler"

C/ Duque de Calabria, 4, 2ª

Tel: 374 23 94

...O BIEN EN LA
ASOCIACION DE
ESPERANTO DE TU
POBLACION

«Cada uno con su idioma
y esperanto para todos.»



KOVRILO: Falla "Plaza del Ayuntamiento" de Valencia, 1990. "Tirant lo Blanc". Héroe medieval valenciano. Mezepoka valencia heroo.

ENHAVO-CONTENIDO Paĝo/ Pág.

* Utilaj adresoj (direcciones útiles)	2
* Novaĵoj pri E-o (noticias sobre Esperanto)	4-13
- "KEEFE prelegas ĉe Parizo	
- "PROXIMOS kongresos	
- "RADIO amatoroj	
- "INSTRUAS al pli ol 200	
- "INTERLAND", unua e-a Plurnacia Fermo	
- "EXPO '92	
- "INTERNACIA Festivalo en Sovet-Unio	
- "PLAN Oficial de Estudio para la enseñanza de Esperanto en España	
- "UNIVERSALA kongreso de Esperanto en Valencia-93	
- "ESPERANTO-Fondaĵo kunlaborantoj -1989-	
- "Vivi en Euskadi"	
- "PROGRAMO de la unua kongreso de Valencia E-o Federacio (Benicassim)	
* TRAIRO de HISPANUJO (Valencia Komunumo)	14-16
* Neniel mi deziras morti antaŭ la jaro 1992 ^a	17-20
* Kontribuado al la interlingvistika terminologio	20-23
* Ni fosas nian sulkon: La "arapeŝoj"	24-25
* Elegio al Ramón Sijé	26
* Deziras korespondi	27
* Enketo	27
* Malapero de la E-a Movado en Hispanujo (1939-40)	28
* Rekomendamos	29
* Sección Pedagógica	30
* Amuzaĵoj	31
* Kunlaboranta Karto	32

DIREKTORO: Johano FONTECHA

 REDAKCIO: Alberto BERMELL

Johano FONTECHA

KUNLABORANTOJ: Johano BOSCH FORMALS

Rodolfo CANET

Augusto CASQUERO

Johano A. GIMENEZ

Bernard GOLDEN

Jesuo MARCO

Georgo MORAGUES

Ludoviko SERRANO

ADRESO: DUQUE DE CALABRIA, 4 (VALENCIO)

TELEFONOJ: 374 23 94 * 374 26 84

PRESITA EN VALENCIO CE: "COPIAS 2"
 Str. JESUS, 80

DEP. LEGAL Nº: V-2 7 9 2- 1989



PROFESORO KEEFE PRELEGAS ĈE PARIZO

La fama usona lingv-instruisto, kiu antaŭe laboris en Valencio por la Internacia Lingvo E-o, prelegis la 25-an de februaro en **Centro Pompidou** ĉe Parizo.

Naskita en 1951 en Kalifornio, Denis KEEFE flue parolas la anglan, hispanan, germanan, francan kaj esperantan, iomete la portugalan. La ĉefa ideo de lia prelego estis ke E-on oni povas utiligi por rolo multe pli ampleksa ol tiu de la sola internacia komunikado. Laŭ li asertis al ni, la kursoj kiujn li faris en Universitato de Ĉeste (Valencio) estis speciale valoraj por siaj konoj de lingva lernado, kaj post sia doktoriĝo, li ŝatus refari la kursojn tie ĉi en Valencio.

KEEF CONFERENCIA EN PARIS

El famoso profesor de idiomas estadounidense, que anteriormente trabajó en Valencia en pro de la Lengua Internacional Esperanto, dió una conferencia el pasado 25 de febrero en el Centro Pompidou de París.

Nacido en 1951 en California, Denis Keefe habla fluidamente el inglés, español, alemán, francés y esperanto, y un poco el portugués. La idea principal de su conferencia fue el que el Esperanto puede utilizarse para un papel mucho más amplio que el de ser sólo un instrumento de comunicación internacional. Según nos afirmó, los cursos que impartió en el Centro de Enseñanzas Integradas de Cheste (Valencia) fue de especial valor para sus conocimientos de aprendizaje de lenguas, y después de su doctorado, querría rehacer los cursos aquí en Valencia.

PROXIMOS CONGRESOS

=====

- * I Congreso de la FEDERACION VALENCIANA DE ESPERANTO

28-29 abril / Benicassim (CASTELLON)

- * III SEMANA INTERNACIONAL de ESPERANTO

29 mayo-6 junio / Niza (FRANCIA)

- * FESTIVAL INTERNACIONAL de ARTE ESPERANTISTA

2-9 mayo / Volyiskiyo (U.R.S.S.)

- * 42 CONGRESO NACIONAL DE ESPERANTO de BULGARIA

28 junio-3 julio / Sumen (BULGARIA)

- * 50 CONGRESO NACIONAL ESPANOL de ESPERANTO

11-16 julio / SANT CUGAT del VALLES (BARCELONA)

- * 75 CONGRESO INTERNACIONAL de ESPERANTO

14-21 julio / La Habana (CUBA)

- * 63 CONGRESO de S.A.T.

4-11 agosto / Linz (AUSTRIA)


ALIGU kaj PARTOPRENU!!!

RADIO-AMATOROJ

La revuo de la hispanaj radio-amatoroj "Revista del radioaficionado" enkondukis ĉi jare novan rubrikon en esperanta lingvo. Kun tiu okazaĵo Hispanio aldonigas al la internacia emo de la radioamatoroj pli kaj pli uzi tiun ĉi lingvon por siaj tutmondaj kontaktoj.

RAIOAFICIONADOS

La "Revista del Radioaficionado"; española, incluye este año un nuevo epígrafe en el idioma esperanto. Con ello España se suma a la tendencia internacional de los radioaficionados, de utilizar cada vez más esta lengua para sus contactos a nivel mundial.



Adekvata distribuaĵo de Radioamatora Stacio

INSTRUAS AL PLI OL 200

Samideano instruisto José GONZALEZ gvidas en Badajoz 7 bazajn kursojn de Esperanto, por pli ol 200 ĝelernantoj (inter ili, 27 ĝeinstruistoj pri E.G.B. Kaj 76 ĝestudentoj de la lernejo pri instruado).

"VIVI EN EUSKADI"

"Vivi en Euskadi" estas video-bendo en la Internacia Lingvo pri la vaska lando, eldonita de la vaska registaro. Ĝi celas diskonigi tra la mondo la aferojn pri la tieaj kulturo, ekonomio, socio, ktp. Oni mendu ĉe la E-o Asocio de Bilbao (Str. Barrenkale Barrena, 7-1ª).

ENSEÑA A MAS DE 200

El profesor José GONZALEZ dirige en Badajoz 7 cursos básicos de esperanto para más de 200 alumnos (entre ellos, 27 profesores de E.G.B. y 76 estudiantes de la Escuela de Magisterio). "VIVIR EN EUSKADI"

"Vivir en Euskadi" es un video en la Lengua Internacional que trata sobre el País Vasco, editado por el Gobierno vasco. Su objetivo es difundir los asuntos y aspectos culturales, sobre economía, sociedad etc. de ese país. Pídelo en Asociación de E-o de Bilbao (C/ Barrenkale Barrena, Nº7-1ª -BILBAO-)

"INTERLAND": UNUA E-a PLURNACIA FIRMAO

INTERLAND estas unu el la unuaj firmaoj kiuj utiligas E-on sur la ekonomia kaj komerca grundoj, la plej antaŭenigaj en nia moderna mondo por tia fenomeno. Interland jam funkcias en Francio, sub la leĝa statuto.

Jen la INTERLAND-a agadoj:

***Firmaoj:** provizas la plurnaciajn firmaojn per kompleta E-o instruo al aliaj ĉiufiliaj dungitoj kun ne sufiĉa lingvoscio (teknikistoj, spertaj laboristoj, ktp) sed kun intensa internacia komunikbezono ene de sia kompanio.

***Tradukservo:** proponas al la firmaoj bonkvalitan tradukservon inter la eŭropaj kaj la ĉefaj aziaj lingvoj pere de E-o, tiel ke la kosto grave plimalaltiĝas ol per la kutimaj tradukfirmaoj.

Foraj Kontaktoj: ebligas al ĉiuj profiti la mondan reton e-an por siaj personaj rilatabezonoj en landoj, kie ili konas neniu (kiu konigos kaj ŝatigos E-on)

**"INTERLAND", primera MULTINACIO--
--NAL DEL ESPERANTO**

INTERLAND es una de las primeras firmas que utilizan el Esperanto sobre el campo económico y comercial, el más vanguardista en nuestro mundo moderno para tal fenómeno. Interland ya funciona en Francia con un estatuto legal.

He aquí sus actividades:

***EMPRESAS:** provee a las multinacionales mediante una completa enseñanza de esperanto a sus empleados filiales con insuficiente conocimiento lingüístico (técnicos, obreros especializados, etc.) pero con un intenso requerimiento de comunicación internacional dentro de su compañía.

***SERVICIO DE TRADUCCION:** propone a todas las empresas un servicio de traducción de calidad entre los idiomas europeos y los asiáticos más importantes por medio del esperanto, de tal modo que el coste se abarata de manera importante respecto a las acostumbradas firmas de traducción.

***Contactos Externos:** posibilita a todos aprovechar el reto mundial esperantista para sus requerimientos de relaciones personales en países, donde no conocen a nadie (que harán que conozcan y les guste el E-o).



LA GLOBUSO

(El globo terráqueo)



***Varmoj:** disponigas al la klientaj firmaoj la E-an vortaron por elekti la nomon de novaj varoj aŭ servoj, laŭ liaj karakteroj kaj la landoj kaj publikoj celataj.

***Komputaraj:** estas realiganta lud-softvaron kiu ludigos intelektale per la E-a vortkonstruado, kun atendebla satigo de la koncepto "lingvo konstruita" al vasta publiko.

Kaj baldaŭ venos servoj pedagogia kaj turisma ...Car Interland estas etendonta siajn agadojn trans la limoj de sia naskiĝlando; oni ĉiuj povas subteni ĝin konkrete: acetante akciojn de la firmao INTERLAND.

Car la ekonomia medio estas la plej grava nuntempe kaj influas la politikajn decidojn same kiel nian ĉiutagan vivon, Esperanto devos pruvi sian efikon sur tiu grundo se ĝi volos agnoskiĝi kaj amase uziĝi!!

NOTO: Petu la prezenton de la INTERLAND-aj servoj kaj financoj, ĉe:
NOTA: Pide la presentacion de los servicios y finanzas en:

INTERLAND

4, rue de la Monnaie

F-30400 Villeneuve-les Avignon

TEL. (33) 90 25 43 77

aŭ ĉe Hispanio al:

Andrés MARTIN GONZALEZ

Poŝtoko 3275

E-29080 MALAGA

TELEVIDE

ĈINIO. La unua premio por instrua filmo estas donita al Televida-Kurso pri Esperanto, videbla per la televido de urbo Ĉindao.

***NOMBRES DE GENERO:** pone a disposición de sus firmas clientes del vocabulario de E-o para elegir el nombre de los productos o servicios, según sus características y los países y públicos de destino.

***INFORMATICA:** se está realizando un "Software" que hará actuar inteligentemente mediante la construcción de palabras en esperanto con un esperable "hacer gustar" del concepto "lengua construida", al vasto público.

Y pronto vendrán servicios pedagógicos y turísticos ...porque INTERLAND está extendiendo sus actividades fuera de las fronteras de su país natal; se le puede tener concretamente: comprando acciones de la firma INTERLAND.

"...porque el medio económico es el más importante actualmente influyendo en las decisiones políticas igual que en nuestra vida diaria, el esperanto deberá probar su eficacia sobre ese campo si quiere ser reconocido y usado masivamente".

TELEVISION

China. El primer premio al programa didáctico ha sido concedido a un curso de Esperanto televisado y difundido por la televisión de la ciudad de Ĉindao

EXPO '92

Esperanton oni adoptis kiel oficialan lingvon por la **Universala Ekspozicio**, kiun oni celebros en **Seviljo** en 1992-a, okaze de la kvina jarcentiĝo de la malkovro de Ameriko. Tiun grandan ekspozicion oni povas jam de longe komuniki komputile per la reto **"Ibertext"**.


INTERNACIA FESTIVALO EN U.R.S.S.

Esperanto-sekcio de turisma organizo "Orbita" okazigos venontan majon (2-9-an) la III-an Internaci-Tutsovetian Festivalon de Esperanto-Arto **"EOLA-90"**.

En urbo VOLJISKIJO (je 16 kmj de Volgogrado); ĝi estos la plej granda Esperant-evento por URSS post la jaro 1926 kaj tie partoprenos reprezentantoj de Sovetia Televido, centra kaj loka presaro, Volgograda Televido kaj Radio.

Nun ĝi jam elsendas konformilojn por partopreni programon de la Festivalo: **Teatro E-a de Parizo**, **Bulgara E-o Teatro**, **Internacia Klasika E-o Aoro**, **Teatro -kia koincido- Okcidenta Germanio**, **E-o Rok-grupoj "PERSONE"** kaj **"AMPLIFIKI"** (Svedio), **Rok-grupo "TEAM"** (Slovakio), **Kabaredo "AMUZO"** (Polujo), **Teatro en kofro** (Ĉeĥoslovakio), **Teatra grupo de Bharato** (Indio); **Trombonisto** el Britujo: **M. BALE**, ktp. Certe la Festivalon partoprenos multaj sovetiaj artistoj.

Speciale ni elstarigu la



EXPO '92

El esperanto ha sido adoptado como un idioma oficial más para la Exposición Universal, que se celebrará en Sevilla en 1992, con ocasión del Quinto Centenario del Descubrimiento de América. Se puede comunicar con esta gran Exposición por ordenador por la red **"IBERTEXT"**.

FESTIVAL INTERNACIONAL EN URSS

La sección de Esperanto de la organización turística **"ORBITA"**, realizará en el próximo mes de mayo (2-9) el II Festival Internacional de Arte Esperantista (**Eola-90"**).

En la ciudad de Volyiskiyo (a 16 kms. de Volgogrado); será el mayor acontecimiento esperantista acaecido allí desde 1926 y en él participarán representantes de la T.V. soviética, la prensa central y local, la T.V. y la radio de Volgogrado.

Hasta ahora han confirmado su participación en el Festival: el Teatro Esperantista de París, Esperanto-Teatro Búlgaro, Coro Clásico Internacional de Esperanto, Teatro "Kia Koincido" ("Qué coincidencia") (Alemania Oriental), Grupos de Música Rock esperantistas: "PERSONE" (Personalmente) y "AMPLIFIKI" ("Amplificar") (ambos de Suecia), "TEAM" ("Equipo") de Eslovaquia, Cabaret "AMUZO" ("Diversión") de Polonia, "Teatro en Kofro" ("Teatro en un cofre") De Checoslovaquia, Troupe de teatro de Bharato (India), el trombonista M. BALE de Gran Bretaña, etc. Por supuesto en el Festival participarán muchos grupos soviéticos.

Destacaremos especialmente

EL Grupo de Rock "T E A M"
en una actuación en Esperanto

ĉeeston de la hispana ĥoro "VERDA STELO", pri kiu ni informis en antaŭa numero pro sia ludado en Torrevieja (Alikanto). Ni rememoru ke ĝi estas ĥoro de Madrida Esperanto Liceo kaj konsistas nun 50 gevoĉuloj, krom la orkestro de 30 muzikistoj, ĉio kunordigite de Profesoro Pedro Villaroig. Ĝi partoprenis ankaŭ, inter aliaj, pasintan konkurson de kristnask-kantoj por ĥoroj en Madrido, kie sukcesegis kaj atingis diplomon.

Organiza Komitato de Festivalo invitas art-kolektivojn kaj kreajn esperantistojn partopreni Festivalon, kun restado senpaga kune kun vojaĝo tien kaj reen.

la presencia del coro español "VERDA STELO" ("Estrella Verde"), sobre el que informamos en un número anterior por su actuación en Torrevieja (Alicante). Recordemos que se trata del coro del Liceo Madrileño de Esperanto y cuenta actualmente con 50 voces, aparte de una orquesta de 30 músicos, todo ello dirigido por el profesor Pedro VILLAROIG.

Ha participado también, recientemente, entre otros, en el concurso de villancicos para coros en Madrid, donde obtuvo un gran éxito además de un diploma.

El Comité Organizador del Concurso, invita a colectivos artísticos y a esperantistas creativos a participar, con alojamiento y viaje de ida y vuelta gratis.

PLAN OFICIAL DE ESTUDIO PARA LA ENSEÑANZA DE ESPERANTO EN ESPAÑA

(diseñado por I.L.E.I. y aprobado por H.E.F.)

<u>NIVEL</u>	<u>RAMA</u>	<u>CONOCIMIENTO</u>	<u>ASIGNATURAS</u>	<u>DIPLOMAS</u>
<u>Primero</u>	-----	Elemental	-----	ELEMENTAL
	Práctica	Medio	-----	MEZA
<u>Segundo</u>	Teórico-práctica	MONITOR-GUÍA	Gramática Hª de Esperanto I Literatura I Actividades I Metodología I	KURSEGDANTO
<u>Tercero</u>	Práctica	SUPERIOR	-----	SUPERA LINGVOSCIO
	Teórico-práctica	PROFESOR	Lingüística Hª de Esperanto II Literatura II Actividades II Metodología II	ESPERANTA INSTRUISTO

*****1*****

UNIVERSALA KONGRESO VALENCIO '93: UNUAJ PAŜOJ

KUNLABORANTOJ:

Per Mono

Urbo

- | | | |
|------|-------------------------------------|----------|
| 1.- | Augusto CASQUERO de la CRUZ | Valencia |
| 2.- | Juan Antonio GIMENEZ GARCIA | " |
| 3.- | Rafael HERRERO GARCIA | " |
| 4.- | César MOSTEIRIN | Segovia |
| 5.- | Juan Carlos RUIZ | Madrid |
| 6.- | Emilio FOLGADO LOPEZ | Badajoz |
| 7.- | E-o Grupo de Callosa del Segura ... | Alicante |
| 8.- | Junulara Asocio "Juna Suno"..... | " |
| 9.- | Valencia E-o Asocio | Valencia |
| 10.- | Esperanto-Fundación "F. Soler" | " |
| 11.- | José SEGUER GARCIA | " |
| 12.- | Juan BOSCH FORNALS | " |
| 13.- | Jesuo RAPOSO MONTERO | " |

Per laboro

Laboro

- | | | | |
|------|------------------------------------|---------------------------------|---------------------|
| 1.- | Augusto CASQUERO..... | Valencio | (komencita) |
| 2.- | Rafael HERRERO | " | (promesita) |
| 3.- | Pascual PONT | " | (") |
| 4.- | Arquimedes BALLESTER | " | (afiŝoj-komencita) |
| 5.- | Adrian MAÑAS | " | (promesita) |
| 6.- | José AÑO | " | (Infan-K-komencita) |
| 7.- | Juan Antonio GIMENEZ | " | (komencita) |
| 8.- | Alberto BERMELL | " | (") |
| 9.- | Juan FONTECHA | " | (") |
| 10.- | Manuel LOPEZ | Sevilla | (promesita) |
| 11.- | Emilio FOLGADO | Badajoz (Filatelio-Promesita) | |
| 12.- | José M ^a BERNABEU | Alicante (vidado-promesita) | |
| 13.- | Juan BOSCH | Valencia (administr.-promesita) | |
| 14.- | Georgo CAMACHO | Madrid (kulturo-promesita) | |
| 15.- | Ricardo ALBERT | " (redaktado-promesita) | |
| 16.- | Gian Karlo FIGHIERA | Italio (libroservo-promesita) | |
| 17.- | Ana MONTESINOS | Britujo (promesita) | |

NOTO: Se vi deziras helpi en la financado de la preparlaboroj por la UK '93, Bonvolu sendi viajn donacojn al:
CAJA de AHORROS de VALENCIA (urbana Marchalenes 0069)
 C/ Málaga, 37 -46009-VALENCIA
 CUENTA N^o: 00693100537732/ Grupo Esperanto Valencia UK '93

ANTAŬDANKON!!!

- * Alberto BERMELL(VALENCIA)
- * Asociación E-o "Valencia" .(VALENCIA)
- * Augusto CASQUERO(VALENCIA)
- * Elisabeta RENOVELL(VALENCIA)
- * Francisco J. ANDRES(VALENCIA)
- * Francisco J. GINES(VALENCIA)
- * Gerardo FLORES(MADRID)
- * Grupo E-o Alicante(ALICANTE)
- * Jorge MORAGUES(VALENCIA)
- * José CLIMENT(BARCELONA)
- * José MARTINEZ(VALENCIA)
- * Josefina MARTINEZ(VALENCIA)
- * José Fernando SOLER(VALENCIA)
- * José Luis PEREZ(MURCIA)
- * José Miguel BERNABEU(ALICANTE)
- * Jesús MARCO(VALENCIA)
- * Jesús RAPOSO(VALENCIA)
- * Juan BOSCH(VALENCIA)
- * Juan FONTECHA(VALENCIA)
- * Luci MORENO(VALENCIA)
- * Naren DHOLAKIA(GRAN BRETAÑA)
- * Rafael HERRERO(VALENCIA)
- * Rafael PERIS(VALENCIA)
- * Rodolfo CANET(ALICANTE)
- * Sociedad E-a "ESTO"(LA LAGUNA)
- * TUTMONDE PACIFISTA MOVADO. (TERRASA)
- * Vincent S. GREGORI(VALENCIA)

NOTO (Nota)

BONVOLU sendi POR FAVOR,
viajn enŭien sus
mon-donacojn donaciones mone-
kaj tarias y
pagojn pagos
al tiu ĉi a esta
bank-konto: cuenta bancaria:

CAJA POSTAL DE AHORROS
(urbana central de Valencia)
CUENTA N°: 00-0.14.776.102
(Esperanto-Fundación "F. SOLER")

DANKON AL ĈIUJ!

OPINIOJ PRI TIU ĈI REVUO***OPINIONES SOBRE ESTA REVISTA ****

"Via oficiala revuo "Internacia Lingvo", estas bonstila, interesa, vigla kaj zorgema, estas juvelo por nia movado, kaj ni, esperantistoj, devas esti tre dankemaj al vi por via malavara agado (...)

R. CANET (Alikante-HISPANUJO)

"Mi tralegis la N-on 1 de "Internacia Lingvo", eldonitan de vi kaj rapide mi sendas al vi tiun ĉi leteron per kiu vi scios mian opinion rilate al ĝia enhavo.

Plaĉas al mi la dulingva eldonado: plaĉas al mi, ankaŭ, la aperigo de novaĵoj pri E-o, la Movado, Lingvistiko, E-a literaturo, Didaktiko ...Krome necesas, ke en revuo kiel Internacia Lingvo aperu artikoloj pri eblaj, realaj, dezirataj rilatoj inter la hispana kulturo kaj la Esperanta.

Mi opinias, ke vi eldonas dulingve la revuon, ĉar vi deziras atingi la rekonon de E-o fare de ne-esperantistoj. Tiurilate, por sukcesi, nepras aperigi tre gravajn artikolojn allogante la atenton de tiuj personoj. La novaĵoj pri E-o nur interesas samideanojn (...)"

A. MARTIN (Malago-HISPANUJO)

ESPERANTO

UNUA KONGRESO DE V. E. F.

KONGRESEJO: "CASA DE LA CULTURA" APUD LA URBODOMO

SABATO 28^a APRILO

- 10.00- Malfermo de la filatela ekspozicio.
- 10.30- Akcepto de kongresanoj ĉe la Kulturdomo.
- 11.00- Oficialaj Ekzamenoj: Baza, meza, instruistoj.
(nepra antaŭinskriboj)
- 12.30- Kunveno de delegitoj de grupoj.
- 14.00- Libera tempo por tagmanĝi.
- 16.00- Preparkunveno de la Ĝenerala Asembleo.
- 18.00- OFICIALA INAŬGURO DE LA KONGRESO.
 - salutoj de reprezentantoj de Esperantaj Grupoj.
 - salutoj de la prezidanto de V. E. F.
 - salutoj de aŭtoritatuloj.
 - festparolado: "Historio de E-o en Valencia"
 - J. Antonio Giménez.
 - folkloro prezentado.
- 20.00- Promenado tra Benicassim.

DIMANĈO 29^a APRILO

- 10.30- Akcepto ĉe Urbodomo.
- 11.30- ĜENERALA ASEMBLEO.
- 13.30- Oficiala Bankedo (Nepra antaŭmendo).
- 16.00- Samtempaj fakoj.
 - projekciado de esperantaj videoj: 1) Euskadi 2) E-on.
 - infana kurseto aŭ parolado.
 - laborkursidoj.
- 19.00- OFICIALA FERMO DE LA KONGRESO
 - diadono de diplomoj.
 - legado de la konkludoj.

- festparolado: "Propedeŭtika valoro de E-o por la lernado de fremdaj lingvoj". Augusto Casquero.

MENDILO (unu po persono)

Aliĝo al la Kongreso.....	300 pesetoj
Bankedo.....	1000 "
Ekzameno de Esperanto.....	500 "
Entute.....	
Donaco.....	

NOMO.....
 ADRESO.....
 TELEFONO.....
 AĜO..... PROFESIO.....

Sendu la mendilon kaj la monon al:

GRUPO DE ESPERANTO VALENCIA

1^a KONGRESO DE VALENCIA ESPERANTO FEDERACIO

Gran Vía Fernando el Católico 45, 3^a 46009 Valencia
 Telefono (96) 3.26.96.16 (lunde, merkredo, vendrede 19-21)

INFORMOJ PRI HOTELOJ

- 1) Hostal "Almadraba": Duobla ĉambro 2.332 pesetoj.
strato Santo Tomás 135 Benicassim Tf. (964) 30.10.00
- 2) Albergue Benicassim: ĉambroj duoblaj, trioblaj k.t.p.
- Junuloj malpli ol 26: tuta pensio kaj dormado kun dormsako 1.135 pesetoj.
- Plu ol 26 jara Tuta pensio kaj dormado kun dormsako 1.300 pesetoj.
Avenida Ferrández Salvador s/n Tf. (964) 30.09.49
- 3) Hotel Bosquemar: Tf. (964) 30.08.63
- 4) Hostal Forcat: Tf. (964) 30.06.98
- 5) Hostal Garamar: Tf. (964) 30.00.11

HISTORIO DE ESPERANTO EN LA VALENCIA KOMUNUMO

HISTORIA DEL ESPERANTO EN LA COMUNIDAD VALENCIANA

(Kompilis: Johano A. Giménez)

1889: Ne okazis en Valencio la unua afero pri Esperanto sed estis la lulilo, kune kun Murcio, de la pli els taraj organizaĵoj de la esperanta movado.

Antono MARCO BOTELLA rakontas, en sia verko "Analoj de la E-a Movado en Hispanujo" ke Sro Joaquín de ARCE BODEGA, bibliotekisto de la Hispana Senato en Madrido, estis kiu interesiĝis pri E-o skribante al Dro Zamenhof kaj ricevante el li tri ekzemplerojn de la Gramatiko. Unu el ili, li sendis al sia amiko RODRIGUEZ HUERTAS, instruisto en Malago, kaj alian al la montingeniero Sro Ricardo CODORNIU.



Codorniu Ricardo

1900: Pro la propagando de PI y MARGALL en la hispanaj gazetoj favore al E-o, ekaktivis la unuaj pioniroj pri E-o tra Hispanio.

1889: No tuvo lugar en Valencia el primer asunto sobre Eo pero fue la cuna -juntamente con Murcia- de las más destacadas organizaciones del movimiento esperantista.

Cuenta A. MARCO BOTELLA, en su obra "Anales del Movimiento Esperantista en España", que el Sr. Joaquín de ARCE BODEGA, bibliotecario del Senado español en Madrid fue quien se interesó sobre el Eo escribiendo al Dr. Zamenhof y recibiendo de él tres ejemplares de la Gramática. Uno de ellos lo mandó a su amigo RODRIGUEZ HUERTAS, maestro en Málaga y otro al ingeniero de montes Sr. CODORNIU.

1900: A causa de la propaganda de PI y MARGALL en las revistas españolas en favor del Eo, comenzaron la actividad los primeros pioneros de Esperanto por España.

En Valencia comenzó a aprender y practicar Eo Sr. JIMENEZ LOIRA y el Capitán Rafael DUYOS y los Padres de las "ESCUELAS PIAS": GUINART y GARRIGOS.

1902: Según un anuncio escrito en un muro de mármol blanco aparecido entre dos paredes contiguas de las Escuelas Pías de la calle "Carniceros" de Valencia, más o menos en el año 1982 tras una reforma de albañilería, la cuna de Eo en Valencia estuvo en estas escuelas y en 1902, porque allí aún podemos leer: "A las Escuelas Pías, cuna del Eo en Valencia en 1902. El primer congreso de esperantistas ibéricos. Mayo de 1923".

1903: En este año, los esperantistas ya habían surgido por todo el país, pero los principales focos fueron Murcia y Valencia. Es muy difícil conocer el número de esperantistas porque muchos de ellos -entre ellos miembros de las Escuelas Pías- no quisieron aparecer públicamente dentro de organizaciones esperantistas, sin embargo, fueron eficazmente activos en sus respectivas escuelas.

En Valencio komencis lerni kaj praktiki E-on Sro JIMENEZ LOIRA; la kapitano Rafael DUYOS kaj la pastroj de la "Piaj Lernejoj": GUINART kaj GARRIGOS.

1902: Laŭ blank-marmora murafiŝo, aperinta inter du apudaj muroj de la "Piaj Lernejoj" de la strato "Carniceros" de Valencio, pli malpli en la jaro 1982 post masonista reformo, la lulilo de Esperanto en Valencio okazis en tiaj lernejoj kaj en 1902 ĉar tie ni ankoraŭ povas legi "A las Escuelas Pías cuna del Esperanto en Valencia, 1902. El primer congreso de esperantistas ibéricos. Mayo, 1923" ("Al la Piaj Lernejoj, lulilo de Esperanto en Valencio en 1902. La unua kongreso de Iberaj Esperantistoj. Majo de 1923").

1903: Dum tiu ĉi jaro, la esperantistoj jam ŝprucis tra la tuta lando, sed la ĉefaj fokusoĵ estis Valencio kaj Murcio. Estas tre malfacile koni la nombron de la esperantistoj ĉar multaj el ili -inter ili membroj de la Piaj Lernejoj- ne volis aperi publike envicigitaj en esperantistaj organizaĵoj tamen, tre efike aktivis por niaj aferoj en siaj respektivaj lernejoj.

En Alikanto, Miguel ELIZAICIN, forte aktivis instruante esperanton kaj en Valencio dum la monato de septembro, la valenciaj esperantistoj decidis fondi sian esperantan societeton "Grupo Esperantista Valencia", kies unua estraro estis:

Prezidanto: Augusto JIMENEZ LOIRA
Vicprezidanto: Antonio GUINART
Sekretario: Enrique QUINZA TORRENT
**Estraranoj: J. TORMO/ A. MARTINEZ/
P. DAUDEN/ P. CERVANTES/
J. LERRED/ J. VIDAL/ E.
de AGUIRRE/ MASCARELL**

Por kunigi la faktojn kaj kunordigi la agadon de la unuaj esperantistoj de Hispanio, la du

En Alicante, Miguel ELIZAICIN fue muy activo enseñando Eo y en Valencia en el mes de septiembre, los esperantistas valencianos decidieron fundar una sociedad esperantista "Grupo de Eo de Valencia", cuya primera Junta Directiva era:

Presidente: A. JIMENEZ LOIRA
Vicepresidente: A. GUINART
Secretario: Enrique QUINZA
**Otros Miembro de la Junta: J. TORMO/ A. MARTINEZ/ P. DAUDEN/
P. CERVANTES/ J. LERRED/ J. VIDAL/
E. de AGUIRRE/ MASCARELL.**

Para conjuntar los hechos y coordinar la acción de los primeros esperantistas de España, los dos grandes núcleos de esperantistas en nuestro país: Valencia y Murcia, se reunieron en Murcia para fundar la "Sociedad Española para la propaganda de Esperanto (H.p.p.E.) el 1 de



D. FERNANDO SOLER

Unu el la unuaj redaktoroj de la revuo "LA SUNO HISPANA" (uno de los primeros redactores de la revista "LA SUNO HISPANA")

plej grandaj kernoj de esperantistoj en nia lando (Valencio kaj Murcio), kunvenis en Murcio por fondi "Hispanan Societon por propagando de Esperanto".

febrero. La Junta Directiva estaba formada por diversos esperantistas entre ellos JIMENEZ LOIRA como vicepresidente y el padre Antonio

LA SUNO HISPANA

Organo de la hispanaj esperantistoj * Organo de los esperantistas españoles

Fondinto: AUGUSTO JIMENEZ LOIRA

Redaktejo: Colón, 24 = VALENCIA

to" (H. s. p. p. E.), la unua de februaro. La estraro estis miksitaj kun diversaj esperantistoj inter ili JIMENEZ LOIRA kiel vicprezidanto kaj la pastro Antonio GUINART kiel sekretario.

En oktobro aperis la unua numero de "La Suno Hispana" en Valencio, kies ĉefredaktoro estis Sro JIMENEZ LOIRA. Ĝi aperis kiel organo de "H. s.p.p.E."

La unuaj verkoj publikigitaj de "Hispana kolekto de Eo en Valencio estis la jenaj:

- * "Gramática de lengua inter" de la pastro GUINART
- * "Diccionario Esperanto-Español" de la pastro GUINART
- * "Esperanto Lengua Internacional" Presita en VALENCIA (nekonata aŭtoro)

1905: Daŭre Valencio publikigis la revuon "La Suno Hispana", kio faris al tiu urbo fokuson gravan de nia Movado dank'al la talento kaj ne la cigebla strebado de kelkaj militistoj kiel JIMENEZ LOIRA, Ramón AYZA kaj Rafael DUYOS, Dro AGUILAR BLANC kaj Fernando SOLER i VALLS.

(DAŪRIGOS en N^o3)

GUINART como secretario.

En el mes de octubre apareció el primer número de *La Suno Hispana* en Valencia, cuyo redactor jefe fue JIMENEZ LOIRA. Apareció como órgano de "H.s.p.p.E."

Las primeras obras publicadas por "Colección Española de E-o" en Valencia fueron las siguientes:

- * "Gramática de Lengua Inter" del Padre GUINART
- * "Diccionario Español de raíces" del Padre GUINART
- * "Eo Lengua Internacional"; de autor desconocido. Impreso en Valencia

1905: En Valencia se publicó la "Suno Hispana", que convirtió a esta ciudad en un importante foco de nuestro movimiento gracias al talento y al incansable empeño de algunos militantes como JIMENEZ LOIRA; Ramón AYZA y Rafael DUYOS, Dr. AGUILAR BLANC y D. Fernando SOLER i VALLS.

(Continuará en el próximo N^o 3)

La Redakcio bonvenigas viajn artikolojn kaj opiniojn. Bonvolu skribi klare kaj koncize. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo ĉar spaco, ofte malpermesas. Tamen la Redakcio ne necese respondas pri la enhavo de la artikoloj nek de la opinioj de niaj kunlaborantoj.

La Redacción da la bienvenida a vuestros artículos y opiniones. Por favor escribir clara y concisamente. Nos reservamos el derecho de resumir las cartas porque frecuentemente el espacio lo impide. Sin embargo, la Redacción no necesariamente responde sobre el contenido de los artículos ni de la opinión de nuestros colaboradores

NENIEL MI DEZIRAS MORTI ANTAŬ LA JARO 1992^a (unua parto)
(De ninguna manera deseo morir antes del año 1992 (1ª parte))

(Luis SERRANO PÉREZ -Sabadell- Hispanujo)

Verŝajne, ke ĉiu mortonto havas la deziron ne morti antaŭ tiu aŭ alia dato, aŭ antaŭ konkreta evento. Aliaj ne deziras morti almenaŭ ĝis kiam ilia idaro estos plenkreska kaj preta kaj kapabla por la batalo de la vivo. Aliaj deziras morti neniam. Evidente tiuj deziroj neniam dependas de la propra persono. Kvankam jam estas iuj, kiu(j) sin mortigas.

Karaj amikoj, ĉar mia aĝo jam ne estas por multe fanfaroni, mia deziro jen estas, vivi almenaŭ ĝis la jaro 1992^a. Mi scias, ke se antaŭe vi ne pensis al tiu dato, se vi ne havis tiun kapricon, vivi ĝis tiu fama jaro, ekde nun vi aliĝos ankaŭ kaj tuj al mia rondo, ĉar, ĉu povas ekzisti iu hispano, kiu ne deziras vivi ĝis tiu dato?. Pensu bone la aferon,

En verdad parece, que todo el que ha de morir tiene el deseo de no morir antes de esa u otra fecha, o antes de un acontecimiento concreto. Otros no desean morir, al menos hasta que su descendencia haya crecido plenamente y esté lista y capaz para la batalla de la vida. Otros no desean morir nunca. Evidentemente esos deseos nunca dependen de la propia persona. Aunque hay algunos que se suicidan.

Queridos amigos, puesto que mi edad ya no está para fanfarronear mucho, mi deseo es, vivir al menos hasta el año 1992. Sé que si anteriormente no pensó en esa fecha, si no ha tenido el capricho de vivir hasta ese famoso año, desde ahora se unirá también y enseguida a mi círculo, porque ¿puede haber algún español que no desee vivir hasta esa fecha?. Piense bien el asunto, querido amigo, e incluso Ud., estima-

kara amiko, kaj eĉ, estimata leganto, se vi estas maljuna kaj doloroj (ne dolaroj) maltrankviligas vian vivon, post legado de miaj surpaperigitaj pensoj, tuj ekkrios: haltu morto, ne venu al mi!

Okazas ke en la historio unu tago valoras pli ol mil jarojn. Ekzemple la tago de la malkovro de Ameriko valoras pli ol mil jarojn, ĉu ne?. Nu, ne forgesu, ke en la jaro 1992^a fariĝos la 500^a jara datreveno de kiam la hispanoj alvenis al tiu parto de la mondo. Tio, evidente, jam sufiĉas por diri: morto haltigu vian laboron!

do lector, si es ud. anciano y unos dolores (no dólares) intranquilizan su vida tras la lectura de mis pensamientos sobre el papel, enseguida grite: párate muerte, no vengas a por mí!.

Ocurre que en la historia un día vale más que mil años. Por ejemplo el día del descubrimiento de América vale más de mil años, no?. Pues bien, no se olvide que en el año 1992 se cumplirá el 500 aniversario de cuando los españoles llegaron a esa parte del mundo. Eso, evidentemente es suficiente para decir: MUERTE HAZ PARAR TU TRABAJO!!

*Mercado de Checacupe
(Perú).*

